

Bedaŭrinde la mondo ankoraŭ scias tro malmulte pri Esperanto kaj pri la multa kaj diversa uzado de Esperanto en la hodiaŭa tutmonda Esperanto-komunumo. Kelkfoje regas eĉ gravaj eraroj pri Esperanto. Aparte bedaŭrinde estas, ke ĝuste lernantoj, kiuj estas grava celgrupo por la Esperanto-lernado, tre ofte nenion scias pri Esperanto. Tial antaŭ kelkaj jaroj mi kun kelkaj aliaj komencis survoĵigi la projekton de

“Unu leciono pri Esperanto por ĉiu lerneĵano”

La ideo estas, ke instruistoj prezentu unu aŭ eble du aŭ plurajn lecionojn pri Esperanto al siaj lernantoj, en la aĝo de proks. dek ĝis dek ok jaroj. La formo liberigas – povas esti referaĵo de lernanto aŭ diskuto aŭ prezento de la instruisto... Ankaŭ la fako liberigas – povas esti la gepatra lingvo aŭ fremdlingvo aŭ historio aŭ sociaj sciencoj...

Povas esti la kutima instruado aŭ antaŭferia horo aŭ anstataŭa horo aŭ projektaj tagoj...

La ideo cetere ne estas, ke la prezenton de Esperanto faru ni Esperanto-parolantoj – ni ne havas sufiĉe da homoj por fari tion. La ideo estas prefere instigi instruistojn, ke ili mem informiĝu pri Esperanto, eble uzu unu el niaj modelaj lecionoj kaj mem prezentu la temon. La sperto montras, ke multaj tion sukcesas fari.

En pli posta fazo certe estos bele oferti trejnseminariojn por instruistoj, en kiuj ili povos iom lerni Esperanton, iom lerni kiel instrui ĝin, iom lerni pri la historio kaj nuntempo de la Esperanto-komunumo. Nu, iom poste – aŭ ĉu eble vi jam entuziasmas nun?

Broŝuro rete elŝutebla

Klaus Friese verkis broŝuron pri tiu propono, kiu estas nun havebla en jam ses lingvoj, Esperanto, angla, franca, germana, turka kaj ekde kelkaj tagoj ankaŭ en la itala.

Libere elŝuteblas sur lia retejo

<http://esperanto-klaus.de/> .

Serĉu tie pri “lernejoj”.

Bv. plusendi la informon!

Bonvenas kompreneble via subteno per plusendo de tiu ĉi informo.

Ankoraŭ mankas multaj tradukoj... Ĉu vi konas tradukemulon?

Se vi tradukos la broŝuron en vian lingvon aŭ persvados iun alian, ni eĉ pli ĝojos ☐

Esperanto en antaŭlernejoj

Cetere ekzistas ankaŭ broŝuro por la prezento de Esperanto en antaŭlernejoj, do antaŭ la sesa vivojaro.

Seminario en Italio

Fine de aprilo 2018 okazos seminario pri tiu temaro en Italio, en Pietrasanta (ĉe la maro, proks. 130 km sudoriente de Ĝenovo), 28-a de aprilo ĝis la unua de majo, en kiu ankaŭ mi prelegos. La temo estos

“Mallonge enkonduki Esperanton en lernejojn”

Prezentos la temon kvino da gvidantoj, zorgos pri la kultura flanko kvaro da artistoj, interalie JoMo. Jen la reta prezento kun aliĝilo

<http://lingvaseminario.it/gvidantoj.php?L=eo>

(Lu Wunsch-Rolshoven)